



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI: 7-a de Junio 2016

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Ŝlomo Ŝaĥar, Matilda Landaŭ, Eldad Salzman, Eran Vodevoz, Gabi Zeevi. Gastoj: Judit Epŝtein, Ŝoŝia

Protokolo de la antaŭa kunsido (3-a de majo 2016) – ĉu estas komentoj?

La estraro esprimas siajn bondezirojn al ĉiuj membroj, kiuj festas siajn naskiĝtagojn en la proksimaj tagoj!

1. Eldonstato de la KD de Ŝoŝia/Amir

Ŝoŝia preskaŭ finis registri. Amir preparis la grafikon. ACUM: Problemo pri rajtoj ĉe unu kanto - anstataŭita. Broŝureto ĉe Yakir Print. 50 por disdonado, 150 por vendado. Espereble pretos por vendado en la LK (50 NIS).

Ŝlomo jam transpagis 3,000; ankoraŭ pagos 500 al Yakir kaj 500 al la produktejo.

2. Memorlibro de Josi - Ĉu eldoni antaŭ la UK aŭ prokrasti? Materialo nuna, aldonota, kaj aldoninda. Proponoj de Jehudit: ŝi pretas trarigardi la grafikan parton kaj la kovrilon. Albumoj ĉe Doron. *Aldoni iom pri lia rilato al la filo Ŝauli.*

a) Kritikoj de Joela 1 kaj 2 (laŭtleĝitaj). Komisiono, ĉu atendi al aldona materialo? *Voĉdono: eldoni antaŭ la UK!*

b) Judaj Ŝercoj - ĉu inkludi ĉiujn aŭ nur malgrandan parton? *Voĉdono: 6 kontraŭ 1 por inkludi la tuton!*

c) Mola/malmola kovrilo kaj kosto (40/80 NIS/ekz). *Voĉdono: mola!*

ĉ) Eldonkvanto (100-200)? *Voĉdono: 150!*

d) Formato (A5 kiel pri Esti kaj IE/A4/alia)? *Voĉdono: A5! (5 pro, 2 kontraŭ)*

e) Dissendo-kriterioj, antaŭmendo dum la LK (membrokotizo 2016) – *la libro estos ilo por pagigi la jarkotizon, nur la pagantoj ricevos ĝin kiel donaco. La plena prezo estos 50 sikloj.*

f) Prezo por vendado en UK kaj en Israelo – *12 eŭroj / 50 NIS.*

3. Financoj (Ŝlomo)

a) Postuloj de רשם העמותות

b) Raporto de la kontisto pri 2015/14

c) Buĝeto 2016 (aldonaj elspezoj laŭ projektoj jam aprobitaj kaj IK)

ĉ) Proponoj por estontaj projektoj kaj elspezoj

d) Projekto proponita de Doron – *ne traktita.*

e) Propono de Ŝlomo pri estontaj buĝetoj (sendita al la estraranoj antaŭ 2 semajnoj)

f) Dek minutoj estos bezonataj dum la LK – Ŝlomo prezentos la buĝeton, plus kvin minutoj por la kontrol-komitato. La membraro devos aprobi (voĉdoni).

2/...



4. Nova klubejo

- a) Kontrakto - ĉu jam subskribita? (Jehoŝua) – ankoraŭ ne! Ni volas vidi malnetaĵon de la kontrakto dum la LK.
b) Parkado - kio pri parkebloj aldone al la unu promesita? – ankoraŭ ne estas respondo.

5. Landa Kunveno 21.6.2016 Ĉu estu inter 18:00 – 21:00 ?

- a) Arta programo (Matilda) – Ŝoŝia, Tali + la grupo, Enrika. Oded ankoraŭ ne respondis.
b. Repago de vojaĝelspezoj de la eurgia grupo (2-3 homoj). *Propono kaj voĉdono: ĝis 500 sikloj kontraŭ kvitancoj (unu sindetenas, ĉiuj aliaj pro).*

6. Dratverejo

- a) Serĉo de nova luanto: Jehoŝua montris al pluraj interesiĝantoj por luprezo de 2800 NIS. Gabi: la anoncon vidis ĝis nun ĉ. 1600 homoj. Ĉu lasi la aperon por plia monato (senpage)? – Propono: jes, ne demeti ĝis subskribo de nova luanto. Jehoŝua: estis ĉ. 20-30 telefonoj, vizitis 6+6+5 homoj, 2 estas pretaj subskribi. Ĉu preferi maljunan paron aŭ junajn homojn? Propono: la maljunulojn.

La venonta kunsido: lunde, la 4-an de julio 2016, je 19:30, en la nova loko!
(WIZO, hejmo de gepatroj, David ha-Meleĥ str. 40, angulo de str. Weizman)

Protokolis: Gabi Zeevi